n-ro 69

julio 2000

# La Merkato

ISSN 0941-9306

**Aperis Inkotermoj 2000**

La membroj kiuj rajtas je senpaga ekzemplero laŭ la informo en LM68, ricevas ĝin kun ĉi tiu numero. Aliaj povas mendi ĝin de la libroservo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen (www.esperanto.be, butiko(a)fel.esperanto.be). Prezo: 19,00 EUR + sendkostoj. Ni ankaŭ klopodos disponigi kvanton en la UK-libroservo.

**IKEF havas retpaĝojn**

Informoj pri IKEF estas haveblaj en Interreto. Ĉina membro metis je dispono de IKEF la adreson www.ikef.org, kiun li registrigis. De tiu adreso estas ligo al www.xs4all.be/~rotsaert/ikef/index.html, kie la IKEF-informoj reale troviĝas. La IKEF-paĝoj ankoraŭ bezonas poluradon kaj pliampleksigon. Interalie estas bezonata datumbazo facile aktualigebla kaj konsultebla, sed ankaŭ protektata kontraŭ misuzo, kiu postsekvu la iaman identecŝildaron.

**Enhavo**

Informoj pri Universala Kongreso . . . . . 3
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . 4-5
Unua E-konferenco pri Ekonomio kaj Esperanto en Siano, Ĉinio . . . . . 6
Ĉinio havas bonajn varojn . . . . . 7
Novaj normoj por internaciaj pagoj: IBAN kaj IPI . . . . . 8
IKEF-laborplano 1998-2000 . . . . . 9-11

**La Merkato** (LM)(ĝis numero 26: Laŭokaza Novaĵletero) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

La **Identecŝildaro** - iam dujara eldono - ne plu aperas. Anstataŭ ĝi, membroj povas aperigi siajn personajn informojn en La Merkato. Ĉiujare ili ricevas kompletan membroliston.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Zoltan Könyves; D-ro Rainer Kurz; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Wang Tianyi

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)esperanto.be.

---

IKEF-informoj en Interreto: http://www.ikef.org

---

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj"). Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampilo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptataj. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK.
Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo.
Por pago per kreditkarto sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo.

**Kontoj**: - ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

**Perantoj**

*Belgio kaj internacie*: Flandra Esperanto-Ligo (fakso 03-233.54.33, retpoŝto finan-coj(a)fel.esperanto.be, belga pĝk. 000-0265338-43)

*Ĉeĥio:* S-ro Vladislav HASALA, A. Dvořaka 1, CZ-696 62 STRAŽNICE; tel./fakso/reg.420-631-332507, retpoŝto vlada_hasala(a)iol.cz

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), tel. kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)aol.com

*Germanio*: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. 07223/942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER István, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani, I-20162 Milano, retpoŝto g.polera-



ni(a)agora.stm.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)

**Spezokonto kaj bilanco**

Je redaktofino de la antaŭa LM ankoraŭ mankis la opinio de la revizoro pri la IKEF-spezokonto kaj bilanco. Kelkajn tagojn poste d-ro Polerani konfirmis ke li aprobas la kontojn.

rr

**Universala Kongreso Tel-Aviv**

Jen la ĉefaj programeroj kiuj povas interesi IKEF-anojn:

**IKEF - Ĝenerala Kunveno:**
Vendredo 28.7, 14.45 - 16.15 h, salono Hodler

**Faka Forumo:**
Vendredo 28.7, 16.30 - 18.00 h, salono Hodler

**Strategia Forumo:**
Lundo 31.7, 14.00 - 18.00 h, salono Hodler

**Speciale por IKEF-membroj:**
**vizito ĉe firmao ESHEDROBOTEC**
Lundo 31.7, ekveturo 9.00 h per buso antaŭ la kongresejo

**Esperantologia Konferenco:**
Dimanĉo 30.7, 14.45 - 18.00 h, salono Hodler

Terminologia Kunveno ne troviĝas en la programo.

**Peltistoj serĉataj**

Samideano Lubomir Streda, aŭtoro de terminaroj pri feloj kaj peltoj (Terminaro de pelt-industriaj maŝinoj, ekipaĵoj kaj ilaro, 1979; Terminaro de pelt-industriaj operacioj, 1981; Terminaro de feloj, 1998) serĉas esperantistojn, kiuj laboras aŭ iam ajn laboris en peltistiko, same ankaŭ zoologojn, zoografojn, bredistojn kaj ĉasistojn, kiujn interesas tiu fako kaj preparataj terminaroj. Ili skribu al lia adreso:

S-ro Lubomir Streda, Podebradova 82, CZ-542 32 UPICE, Ĉehio

Retajn mesaĝojn por li povas akcepti Esperanto-muzeo en Ceska Trebova



<Kulturni.Klub(a)ct.anet.cz> aŭ Miroslav Malovec <starto(a)clavis.cz>.

## Komercaj petoj kaj proponoj

**Bulgario/Hungario**

En junio estos la oficiala malfermo de bona negoco en Bulgario! Mi serĉas kontaktojn en tiu lando, inter geesperantistoj, kiuj volas kapti la bonŝancon, frue aliĝi al la freŝa kaj profitdona negoca ebleco. Se vin interesas iom la bona sano, varoj kiuj havigas ĝin, kaj se vi ŝatas varbi, konversacii, sed ne tro ŝatas vendi ion ajn, bv. skribi al mi ĉu letere, ĉu rete, plej baldaŭ. Vi povas loĝi ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj, ĉar la negoco estas jam sufiĉe internacia ! BAJAKI Imre, 6100 Kiskunfelegyhaza, Hollo Laszlo u. 24., Hungario; rete <baja59(a)freemail.hu>

**Ĉinio**

Importo de eluzita papero: Ĉinio tradicie importas eluzitajn paperojn kiel materialon por paperfabrikoj. La merkato estas tre vasta. Ni atendas vian oferton. S-ano WANG Tianyi (Chielismo VON), China Shaanxi Tongchuan Import & Export Co., Tel:+86-29-2242215 Fak-so:+86-29-2232952,
rete: <komerco(a)public.xa.sn.cn>, <esp(a)pub.xaonline.com>, <informo(a)komerco.com>, <http://komerco.com>

**Ĉinio/Internacie: disko 'Gajna lernado de Esperanto'**

Ĵus venis sur merkato nova disko (CD-ROMo) por lerni Esperanton: 'Gaja Lernado de Esperanto'. Prezo: po 15 USD (aŭ egalvaloro), inkl. de aerpoŝtaj sendkostoj, al UEA-konto 'tnyi-g' de Chielismo VON (WANG Tianyi)
fakso:+86-29-2232952, rete <komerco(a)public.xa.sn.cn>.

**Francio**

**Informoj pri franca provinco Anjou en Interreto**

Informoj pri turismo kaj ekonomio en la franca provinco Anjou [anĵú], departemento Maine-et-Loire, en kiu situas la E-kulturdomo de la kastelo Grésillon (49150 Baugé) estas troveblaj je http://perso.wanadoo.fr/dan.cdm/anjou/index.html.

A. Frangeul

Ni serĉas fakan artiston kiu povus konstrui vitralojn (fenestrojn de preĝejo). Petu la desegnon por fari vian prezon de TAKE-ESPERANTO.



Konstrua Entrepreno CL-BATIMENT dungas masonistojn kaj ĉef-masonis-tojn por labori en Alzaco, Francio. Longdaŭra kontrakto. Nepre bezonatas labor-rajto en Eŭropa Komunumo. Lingvoj: fran-ca/itala/portugala aŭ Esperanto. Kontakto: TAKE-ESPERANTO, 90, Rue du Tiefenbach, FR-68920 WINTZENHEIM, Francio.
Fakso: 00333.89.79.43.33, Rete: <100623.3022(a)compuserve.com>

**Irano**

**AMIN VOJAĜ-TURISTA AGENTEJO**

Ni ofertas jenajn servojn:
1- Rezervas internaciajn kaj enlandajn flugojn en ĉiuj aero-linioj
2- Rezervas hotelon en la tuta lando Irano
3- Asekuras vojaĝantojn kaj varojn - grupe kaj individue
4- Tradukas ĉiujn dokumentojn al fremdaj lingvoj
5- Departamento de eduka kaj komerca konsultiĝo por vojaĝantoj al Irano
6- Faras enlandajn turistajn programojn grupe k individue
7- Preparas eniran vizon por fremdaj vojaĝantoj al Irano; ankaŭ prizorgas vojaĝan kaj komercan asekurojn
8- Organizas diversajn turistajn programojn kulturajn, arkeologi-ajn kaj aliajn
9- Plenumas turistajn programojn por ĵurnalistoj kaj amasmedioj
10- Transportas surtere kaj aere

Adreso : Suite # 1 , 32 Bokharest Ave., Tehran, Iran
Telefono : +98 21 8728612-14 (s-ro Sadegh Karami)
E-mail : AminAir(a)systemgroup.net
Fakso: +98 21 8728550
Interreto: http://WWW.AMINTOURS.COM

**Pollando**

Mi serĉas firmaon aŭ personon kiu povus esti liveranto de kompakt-diskoj al Pollando. Temas pri monata kvanto de 100.000 diskoj, kaj prezo de unu disko devas esti ĉirkaŭ 1,10 DEM. Interesito bonvolu kontakti nin. Andrzej Cwalinski, <cwalinski(a)bigfoot.com> (Eventoj - Ret-Info)

## Jack Snarberg forpasis

Je la 17a de januaro 2000 mortis, 79jara, nia sveda membro Jack Snarberg (IKEF 138). Profesie li estis juvelisto. Unuan kontakton kun IKEF li havis en 1986, dum la pekina UK. Li aliĝis al IKEF en 1991 en Oostende, okaze de la tiea konferenco 'Ĉinio Aktive'. Pasintjare li

ankoraŭ partoprenis nian ĝeneralan kunvenon en Berlino. rr

**La Unua Esperanta Konferenco pri Ekonomio kaj Komerco en Ĉinio**

Ĝi okazis dum 1-4 aprilo 2000 en Siano. Ĝin partoprenis 20 personoj el ĉinaj regionoj inkluzive Honkongo. Al ĝi gratulis prezidanto de IKEF kaj multaj aktivuloj el Esperantujo. Tamen ĝin ne partoprenis e-istoj eksterlandaj, kvankam aliĝon anoncis E-komercistoj el Niĝerio, Ganao, Tajlando, Vietnamio kaj Koreio. Plejparto de la partoprenintoj estis profesiaj komercistoj. La konferenco okazis je esenco malsame kiel simila kunsido dum kongresoj de Esperanto. Oni raportas, ofertas kaj diskutas pri komercaj aferoj. Ĉiuj partoprenintoj estis kontentaj tiel, kiel ni povas profunde kontakti por komerca celo. Tio ne eblas okazi dum kongresoj de Esperanto. Oni sopiras al alifoja konferenco dum 1-4 Aprilo 2001.

Ĉielismo VON (WANG Tianyi) - ĉina Peranto de IKEF

**Ekofomo denove haveblas**

En 1992 IKEF faris Esperanto-version de la terminaro Economie, Finance, Monnaie (Ekonomio, Financo, Mono, mallongigite Ekofomo) de



la Eŭropa Unio. La terminaro jam de kelkaj jaroj estis elvendita; ĵus aperis nova eldono. Ĝi aĉeteblas ĉe la libroservo de Flandra Esperanto-Ligo (butiko(a)fel.esperanto.be; www.esperanto.be) je 9,50 EUR + sendkostoj.

**Ĉinio havas bonajn varojn**

La grandaj kaj mezaj komercantoj kiuj legas ĉi tiun informon eble trovos en ĝi ion utilan por sia komerco.

Ĉinio produktas multajn aparte bongustajn manĝaĵojn. Sekaj vinberoj kaj sekaj hami-melonoj el ĉina Xinjian-provinco estas tre ŝatataj pro sia bongusto. Ambaŭ estas sekigataj de la varmo de la suno. La hami-melonoj pro tio havas specialan guston; ili estas konserveblaj dum unu ĝis du jaroj.

Aliaj bonaj produktoj, el diversaj ĉinaj provincoj, estas nigra-orelfungo, blank-orelfungo, sekjujubo, sekfungo, arakido, sezamo, nukso, ĉerizo, sojfabo, Longĝin-teo, verda teo kaj ruĝ-kansukero.

Kiam oni sentas sin malbona, post trinkado de saketo de ruĝ-kansukero en varmega akvo, oni rapide perceptas boniĝon. La nigra-orelfungo povas forigi malpuraĵojn el la homa korpo.

Mautaj-brando kaj Wuli-brando estas sorgobrandoj famaj tutmonde. La Mautaj-brando iam akiris oran pokalon je internacia kunveno. Aliaj bonaj sorgobrandoj estas Luzhoulaoyao-brando, Lushoudaqu-brando, Kongfujiajiu-brandu (Kongfu-hejmaro ofte trinkas ĝin), Kongfu-bankeda brando, Fenjiu-brando, Xinghuacun-brando kaj Lanjiu-brando.

Bongusta Huanghe-rivero-biero el okcidenta Ĉinio estas fermentigita per minerala akvo el la Qilianshan-monto.

La bele ornamitaj nacimalplimultaj viraj kaj virinaj kostumoj de la Yunlan-provinco estas ŝatataj donacoj por eksterlandanoj.

Komercistoj kiuj interesiĝas pri tiuj produktoj povas skribi al mi. Mi peros ilian mendon ĉe la serva oficejo de mia registaro, kontraŭ makleraĵo de 5%.

***

En la Xinjian-provinco oni trovis grandajn kvantojn da petrolo kaj gaso. Por ties ekspluatado bonvenas eksterlandaj investantoj. Same por minejoj de baŭksito kaj kupro, por gastejoj kaj amuzejoj... Diversaj metodoj de investado eblas. Ankaŭ por tiaj projektoj mi pretas asisti.

Chen Dinsu

Mia adreso: Fuliqu Tuiguan-ban, Lanhua 304-Chang, CN-730060 Lanzhou, Gansu, Ĉinio.



**Du novaj normoj por internacia pagoj: IBAN kaj IPI**

Jam de longa tempo eŭropaj organizoj de konsumantoj plendas ke internaciaj pagoj multekostas, longe survojas kaj ofte perdiĝas. Unu klarigo por tio estas la kontonumeroj, kies strukturo en ĉiuj landoj malsamas. Eblas ke paganto pro nescio skribas nekompletan aŭ eraran numeron sur sia ĝirilo; tian eraron la eksterlanda banko tro malfrue aŭ tute ne rimarkas.

Por solvi la problemon, la bankoj ellaboris internacie uzotajn normojn por kontonumeroj kaj pagiloj. En kelkaj eŭropaj landoj oni jam ekuzas la normon; en tuta Eŭropa Unio la uzo estu ĝenerala ekde la jaro 2002.

**IBAN: Internacia bankkonto-numero**

Firmaoj kiuj komercas internacie estonte menciu du kontonumerojn sur siaj fakturoj: la nunan por enlanda uzo; alian, iom pli longan, por internacia uzo. Ekzemple belga kontonumero nun havas strukturon kiel:

510-0075470-61

La internacia numero estas la sama, tamen kun 8 antaŭantaj signoj:

IBAN BE62 510 0754 7061

'IBAN' indikas ke la numero havas la norman strukturon, 'BE' estas la ISO-landkodo kaj '62' estas kontrolcifero; la tuto estas grupigita en po 4 signoj. Apenaŭ eblas mem kalkuli la kontrolciferon. La bankoj aŭtomate komunikos la novan numeron al siaj internacie negocantaj klientoj.

Por kelkaj landoj ankaŭ aldoniĝas kodo kiu indikas la bankon. Ekzemple nederlanda numero kiu nun estas:

041 71 64 300

por internacia uzo iĝos

IBAN NL91 ABNA 0417 1643 00

kie 'ABNA' estas la kodo de la banko.

**IPI: Internacia pag-instrukcio**

Nun ĉiu banko havas sian propran formularon por doni internacian paginstrukcion. Estonte estos tutmonde normigita formularo kiun la liveranto povas prepari samtempe kun la fakturo. La paganto nur devas aldoni sian kontonumeron, subskribi kaj sendi al sia banko.

Teknikaj informoj (i.a. en angla, franca, germana, nederlanda) haveblas je www.abb-bvb.be kaj www.ecbs.org.

rr

## Komuna seminario de IKEF kaj TAKE en printempo de 2001

En la printempo de 2001 IKEF kaj TAKE kune organizos seminarion pri temoj kiuj povas interesi membrojn de ambaŭ fakaj asocioj. Ĝi okazos en kadro de staĝaro preparita de la Esperanto-grupo de Mulhouse (regiona asocio Espéranto France-Est).

Dato: de la 20a ĝis la 22a de aprilo 2001 en la valo de Thann, LE TORRENT, F-68470 STORCKENSOHN antaŭ la vogeza montpasejo BUSSANG.

Aliĝilo havebla ĉe: S-ro André GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées, F-68390 BALDERSHEIM; retadreso: <andre.grossmann(a)mageos.com>

## Nova membro

302. S-ro CHEN Jinyin (Chen Dinsu), Fuliqu Tuiguan-ban, Lanhua 304-Chang, CN-730060 Lanzhou, Gansu, Ĉinio, tel. +86-931-7578805

## Novaj adresoj

243. S-ro Aleksandâr ZAĤARIEV - VICTORIA Ltd, P.O.Box 90, BG-1407 SOFIA, Bulgario
250. Silvio Kniess Mates, Rua Frei Evaristo, 152, Centro - Florianopolis - SC, CEP 88.015-410, Brazilo, <silvio(a)esperanto.nu>
253. Marian G. IVANOV, p.k. 282, BG-3400 MONTANA, Bulgario, <mariajn(a)net-surf.net>

## Laborplano 1998 - 2000

En nia Ĝenerala Kunveno 1998 en Montpeliero ni akceptis la Laborplanon 1998-2000, kiun ni estis ellaborintaj kadre de la UEA-kampanjo 2000 por internacia lingva ordo. Tiu laborplano, kiun vi denove trovas sur paĝo 11, enhavas diversajn celtrafajn agadojn (celtrafe en la senco de nia laŭstatuta celo AKCEPTIGI/ENKONDUKI ESPERANTON SUR LA KAMPOJ KOMERCO, EKONOMIO KAJ EKONOMIKO). La estraro elektis specife ĉi tiujn agadojn, ĉar ili havas realisman ŝancon por realigo.

Hodiaŭ mi volas atentigi vin al cifero 1.4.2 d):

**Instigi kaj subteni negocon inter E-istaj komercistoj**

Ĉe tio mi unuarange alvokas la komercistojn inter ni, t.e. personoj kiuj pangajnas sian vivon per komercado. Povas esti memstaraj entreprenistoj - precipe personoj kiuj aĉetas kaj vendas iujn varojn. Sed



povas ankaŭ esti dungitoj en iu entrepreno, kiuj laboras en la sekcioj pri aĉeto kaj pri vendo (eksporto).

Por la unuaj (memstaraj) estas tute normale, ke ili provas aŭ aĉeti aŭ vendi varojn de/al aliaj esperantistaj komercistoj en la tuta mondo. Tio iom pli malfacile aranĝiĝas por la duaj (dungitoj). Li/ŝi devas obei al la reguloj kaj preskriboj de sia entrepreno. Tamen, laŭ mia propra sperto kiel estro de aĉetsekcio en germana fabriko, ĉiu persono en aĉeta aŭ venda (eksporta) sekcio havas la liberecon propra iniciate serĉi liverantojn respektive klientojn kie ajn en la mondo kaj efektivigi ĉe tio la necesan korespondadon, ... ankaŭ en Esperanto. Kompreneble se li/ŝi estas la sola Esperantisto en sia sekcio aŭ firmao, li/ŝi devas mem fari tiun korespondadon kaj, se necese por kolegoj, traduki tiun en la nacian lingvon. Tamen la ĝojo pri sukcesa negoco kun liveranto aŭ kliento surbaze de Esperanto, favore por sia entrepreno, kompensas la penon.

Alia ŝanco por interveni en esperantlingvan komercadon ekzistas por ĉiu de ni:

Se vi legas ekzemple anoncojn en La Merkato, La Domo (TAKE), Monato aŭ en aliaj esperantlingvaj revuoj, do anoncoj en kiuj iu serĉas aĉetanton aŭ vendanton de iu varo aŭ servo, vi povas roli kvazaŭ peranto kaj tradukanto. Se ekzemple ĉina firmao ofertas ĉinajn artmetiaĵon, vi povas kontakti en via urbo aŭ regiono komerciston komercantan tiajn varojn, traduki al li la oferton en la nacian lingvon, kaj en kazo de intereso, respondi en Esperanto al la anoncanto. Se ekestas el tio plia korespondado kaj eĉ mendo kaj liverado, vi povas ĉiam asisti en tio kaj eble gajni procentaĵon.

Ĉio ĉi havas kvar celojn:

1. Plenumi la bezonon de iu homo pri dezirata varo je favora prezo;
2. Plialtigi la enspezon de vendanto;
3. Montri al la koncernitaj kaj ĉirkaŭantaj homoj, ke Esperanto kiel interlingvo ekzistas kaj ankaŭ en komerco funkcias;
4. Havigi al si mem monenspezon (procentaĵon), renomon aŭ/kaj kontentiĝon pro sukcesa agado.

Mi deziras al vi agemon, inventemon, kontaktemon, kaj fine sukceson en tiu agado.

Franz Josef Braun, Prezidanto

| IKEF-LABORPLANO 1998-2000, kadre de UEA-Kampanjo 2000<br>por internacia lingva ordo, aprobita dum la ĝenerala kunveno de IKEF | | | |
|---|---|---|---|
| cif.<br>UEA | speco de agado | responsulo<br>↓ | prioritato↓ |
| 1.4.1 | Kampanjo "por pli vasta verdujo"<br>Pligrandigi la membraron de IKEF<br>a) Difino de celgrupoj varbotaj<br>Ĉiuj homoj, kies profesio aŭ pangajna laboro rilatas al komerco, ekonomio kaj ekonomiko<br>b) Difino de membronombro atinginda<br>200 membroj ĝis fino de 2000<br>- moto: Ĉiu membro varbu novan membron<br>- sendigi varbleteron tra UEA al ĉiuj UEA-membroj , kies profesio rilatas al nia fako<br>c) Krei argumentaron por "vendi" IKEF al siaj celgrupoj; establi laborgrupon por tio | estraro<br>estraro<br>ĉiuj m.<br>prez. FJB<br>prez. FJB | 1<br>1<br>1<br>1<br>2 |
| 1.4.2 | Celtrafaj IKEF-aj agadoj<br>a) Okazigi vizitojn dum UK-semajnoj ĉe lokaj entreprenoj kaj/aŭ ekonomiaj institutoj<br>b) Okazigi similajn vizitojn dum aliaj Esperanto-aranĝo-j, kondiĉe ke almenaŭ tri IKEF-membroj ĉeestas la aranĝ-on<br>c) Havigi reklamanoncon de entreprenoj al E-gazetoj<br>**d) Instigi kaj subteni negocon inter E-istaj komercistoj**<br>e) Terminara laboro<br>f) Verki fakajn artikolojn en E-gazetoj | prez. FJB<br>koncernataj membroj<br>ĉiuj mem-broj<br>ĉiuj mem-broj<br>Yamasaki<br>membroj k. ĵurnalisma talento | 1<br>2<br>1<br>1<br>1<br>1 |
| 2.1.1 | Disvastigo de informoj pri E-o, UEA kaj IKEF<br>a) Regule ĝisdatigi kaj ampleksigi la IKEF-ajn informpaĝojn en TTT<br>b) Plibonigo/plirapidigo de la komunikado inter membroj per uzo de retpoŝto<br>c) Produkti nian IKEF-informilon E-lingvan ankaŭ en la plej gravaj naciaj lingvoj; krome tiaj tekstoj aperu in interreto<br>d) Post ricevo de la plej bonaj informiloj nun ekzistantaj kaj tradukeblaj el naciaj lingvoj, kiujn la UEA-estraro elektos, ni kunhelpos al traduko kaj disvastigo (nur de tiuj kiuj iom rilatas al nia fako) | B. Holm<br>ĉiuj mem-broj<br>redaktoro RR<br>Yamasaki S. | 1<br>1<br>2<br>3 |
| 3.5 | Kontaktoj kun ekstermovadaj instancoj, kies aktivecoj rilatas al la celoj de IKEF<br>a) Komisiono de EU - Ekonomia Direkcio<br>b) Naciaj ministerioj pri ekonomio<br>c) Ekonomia fakultato de universitatoj kaj komercaj altlernejoj<br>d) Komercaj ĉambroj | M. Cwik<br>prez. FJB<br>sciencistoj pri ekono-mio<br>membroj kun kontaktoj al K.Ĉ. | 2<br>3<br>2<br>2 |



## Terminologio

**KAEST 2000 - renkontejo de fakuloj kaj terminologoj**

ĈeĤa Esperanto-Asocio kaj kongresa agentejo KAVA-PECH kore invitas vin al Kolokvo Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST) okazonta en Prago (CZ) 2000-11-10/12 sub aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio (UEA)

La kolokvo estas kontribuo de ĈEA al la kampanjo 2000

Pritraktotaj temoj:
Sekcio A: Ekonomio sojle al la tria jarmilo
Sekcio B: Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto
Sekcio C: Aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko (ĝenerale)

Kolokvejo: Teknika Universitato Prago, konvene lokita en la urbocentro, Karlovo namesti 13, Praha 1, metroostacio Karlovo namesti.

Partoprenkotizoj: ĝis 2000-07-31 EUR 30, por B-landanoj laŭ UEA: EUR 15. Honoraj membroj de UEA kaj ĈEA rajtas aliĝi senpage, tamen nur en la unua periodo (ĝis 2000-08-20). Aliĝante pli malfrue ili perdos tiun avantaĝon kaj devos pagi la kotizon kiel ĉiuj ceteraj kolokvanoj.

Alvoko por kontribuaĵoj: Aŭtoroj de la kontribuaĵoj estas petataj sendi siajn aliĝilojn kun titolo de la kontribuo kaj mallonga resumo (ne pli ol 50 vortojn) se eble plej frue, sed plej malfrue ĝis 2000-08-20.

Tranoktebloj: en bela tristela hotelo UNION (po EUR 33 en dulita ĉambro) aŭ en unustela sed sufiĉe agrabla hotelo LIBEN (EUR 10 en dulita ĉambro).

Antaŭkolokva seminario en Dobrichovice apud Prago:
Antaŭ la kolokvo okazos en Dobrichovice sub aŭspicioj de IFEF terminologia seminario "(Ne nur) fervoja transporto kaj trafiko". Dato: 2000-11-08/10. Loko: Pensiono SOKOL Dobrichovice (20 km de Prago, ĉiuj aliĝintoj ricevos precizan planon inkluzive la horaron de Praha al Dobrichovice).

Pli da detaloj pri la kolokvo kaj antaŭkolokva seminario petu ĉe:
KAVA-PECH, Anglicka 878, CZ-25229 Dobrichovice
Tel.: 420.2.9912201, fakso: 420.2.9912126
Rete: kaest(a)kava-pech.cz; http://kava-pech.cz/kaest